BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

CGC Nº
00406 504/1000-06

PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1.182
Telefone 42-9090
70.000 – Brasília (DF)

Nº 17 - JULHO DE 1976 ----- BOLETIM INFORMATIVO

Redação : ---- MARIA ALMADA

## XI SEMINÁRIO DE ESPERANTO

Lia Ekscelenca Moŝto D-ro Elmo Serejo Farias, guberniestro de la Federacia Distrikto kaj alta patrono de la XI Seminario de Esperanto, en la 15-a de julio pasinta solene malfermis la Seminarion.

Spite de lia troa okupiteco, la Guberniestro aperis en la ĝusta horo kune kun la prezidanto de la Seminario, D-ro Nid Dutra D'Amorim. Li salutis afable la eventon, dezirante al la ĉeestantaro sukceson kaj fruktodonan laboron al la Seminario.

La 14-an de julio, Lia ekscelenca Moŝto akceptis grupon da gesamideanoj en la palaco "Buriti", akompanataj de S-ano D-ro D'Amorim, por ne formala vizito.

Ĉeestis la reprezentanto de la Universala Esperanto Asocio, S-ano Torben Kehlet, el Danlando; la geedzoj Einihovic el Aŭstralio; F-ino Saly, el Anglio; la familio Grattapaglia, el Bona Espero; la prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto, Prof-ro F. S. Almada kaj edzino, S-ino Maria Almada; la ĝenerala sekretario de BKE, N. P. Souza kaj la financa direktoro de BKE Carlos A. S. da Cunha.

La akcepto estis kompleza, tre agrabla.

La gazeto "O Governador" aperigis detalan artikolon pri tiu vizito.

-----***** -----

La prezidanto de la Seminario, kiu estas ankaŭ ĝenerala direktoro de DER (DF), radiamatoro kaj bonega esperantisto, sukcesis akiri senpagan loĝadon kaj manĝaĵon por la esperantistaro, kiu partopre

prenis la Seminarion.

Tio estis gravega helpo de D-ro D'Amorim, kiun ni devas danki el tuta koro.

Sed nenur tion li faris Senlace li klopodis helpi ĉiamaniere al la promociantoj de la Seminario.

Li kaj lia edzino, s-ino Maria Izabel, fakte briligis la eventon.

En ilia hejmo, dum vizito, oni sentis sin fratece, en tre kortuŝa akcepto farita al aro da gesamideanoj, kie la bajanoj trovis eron de sia ŝtato, la fama Bahia kie ili naskiĝis.

------ **** -----

La unua vicprezidanto de la Seminario, Komandanto Eurípedes do Nascimento, iom rigora, sed bonkora, tre zorgema, estas komandato de FREL.

Li prizorgis la organizadon de la interfraterniga tagmanĝo, okazinta post la realigo de la ĝeneralaj laboroj. Lia aĝado estis vere laudinda kaj senlaca.

----- ***** ------

La dua vicprezidanto de la Seminario estis D-ro Enivaldo Alves Silva, kiu same kiel la alia multe kunlaboris por la sukceso de la Seminario.

----- **** ------

Dum la unua laborkunsido parolis S-roj Grattapaglia, Pandiã Pandu kaj D-ro Nid Dutra D'Amorim.

Dum la dua parto parolis la Prof-ro Walter Seipp, Prof.ro Sylla Chaves kaj Roberto P. Nogueira.

----- **** ------

La postaj laborkunsidoj estis viglaj. Parolis denove s-roj Grattapaglia, Torben Kehlet, Prof-ro Laszlo Zinner kaj la pastro José Nogueira Machado.

Poste D-ro BrazCosenza parolis pri la historio de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, ĝia laboro, kaj pri ĝia datreveno, la 25-a, nun memorfestata.

------ **** ------

La kultura parto de la Seminario konsistis el deklamadoj kaj kantoj. Akompanis la pianisto André Luiz. Inter tiuj, kiuj kantis estis Jorge Marques kaj la koraloj de la katolika kaj evangelia junularoj.

----- ***** ------

La plej solena parto de la Seminario estis la sankta meso celebrita de S-ano pastro Nogueira Machado en la moderna kaj mondfama katedralo de Brazilio.

La tutan programon direktis S-ano Prof-ro Amarilio Carvalho.

Dank'al li ĉio marŝis bone kaj glate. S-ano Amarilio estas ano tre ŝatata de nia ronda familio.

ATINGOJ

La decidoj de la Semina-

rio estis la jenaj:

1-Estis elektita ĉefdelegito por la tuta Brazilo S-ano Giuseppe Grattapaglia;

2-Estis akceptita la invito de la urbestro de Marilia (SP) por okazigi Latinamerikan Kongreson en tiu urbo dum la jaro 1978-a;

3-Estis decidita kaj invitita la okazigo de Universala Kongreso en Brazilio dum la jaro 1980-a;

4-D-ro Braz Cosenza akceptis kaj promesis kunlaboradi kun nia organizo BKE.

Ni kore dankas lian apogon kaj bonvolon.

-----****-----

En la kadro de la XI Seminario okazis kunveno de BEJO. La junularo riproĉis la plenkreskulojn, kiuj ne helpas ilin. Ilia deziro estas, ke ĉiuj aliĝu al BEJO por iu serioza kunlaboro.
"Sen mono ne eblas agadi", diris la prezidanto Ciro Freitas.

Prof-ro Sylla Chaves proponis, ke la junularo apartiĝu de la plenkreskuloj, ke oni aranĝu al ili sidejon kaj tiel ne estos necesaj la plenkreskulaj helpoj. Nur li ne diris, kiu donos al BEJO la bezotan monon.

Ne estis akceptita tiu propono.

Tiam la Ĝenerala Sekretario de BKE proponis helpi BEJO'n. Li sugestis, ke la Brazila Konsilantaro de Esperanto bezonas zorgi pri BEJO. Kompreneble, la KKE neniam rifuzis helpon kaj certe kunlaboros kun BKE sur tiu kampo.

----- **** -----

La ĉijara Seminario havis artan programeron. Du geesperantistoj ekspoziciis siajn pentraĵojn.

F-ino Maria Delgado, pentristino el Santos, lermantino de Prof-ro F.S. Almada, ekspoziciis belajn oleajn bildojn, nombrante pli ol dudek artaĵojn.

La Guberniestro, D-ro Elmo Serejo Farias subskribis la notlibron de la artistino. Lin postsevis centoj da vizi

tantoj.

Aŭdigis laŭdoj rilate la ekspozicion, kiu bonege impresis ĉiujn.

Ŝi estis omaĝinta per varmaj aplaŭdoj dum la kultura parto de la Seminario.

Krom tio, junulo el Bona Espero, pere de akvareloj montris detalojn de tiu bieno, pri kiuj ĉiuj interesĝis.

----- ****-----

Multaj gratulleteroj kaj telegramoj estis ricevitaj de la organizantoj. Inter ili elstariĝis mesaĝo de la federacia deputito Athiê Jorge Coury adresita al prezidanto de BKE, S-ano F.S.Almada, dezirante sukceson al la Seminario kaj progreson al BKE.

Pri la grandskala Seminario la gazetaro kaj la TV Globo kaj Tupi ĉion diskonigis amplekse.

MONDONACOJ RICEVITAJ

Ni ricevis kaj dankas el tuta koro la jenajn kvantojn-:

| | |
|---|---|
| Elvira Fontes | 50,00 |
| Lauro J.Oliveira | 200,00 |
| Carlos Dionisio | 200,00 |
| Delio P. Souza | 100,00 |
| Frco.Moraes Sobrº | 100,00 |
| TUTO... | 650,00 |

SCIIGOJ

San-Paulo- Nia samideano Oswaldo Leite de Moraes skribis al ni leteron kun afablaj vortoj kuraĝigante nin.

Ni laboros por la movado ĝis kiam eblos.

Rio Grande (RS)- Nia vicprezidanto Dirceu Porciuncula informis nin, ke la fraŭlino Irlani Calcagno kontaktiĝis kun la juna José Almeida, kiu estas funkciulo de la radio "Minuano" en Rio Grande, por disvastigi Esperanton. La juna kaj entuziasma Almeida tuj akceptis la inviton kaj organizis junularan grupon, kiu nun eklaboras pere de la radio.

Samtempe la prezidanto de la Societo Rio Grande faris bonegan prelegon pri la Internacia Lingvo, ĝia aŭtoro kaj pri la organizaĵoj nuntempaj en Brazilo.

Ni kore gratulas al niaj vicprezidantoj Dirceu Porciuncula kaj George Otto Vaske pro ilia utilega kunlaboro. Samtempe ni deziras daŭran sukceson al niaj progresemaj gesamideanoj en Rio Grande.

Sorocaba (SP)- Nia vicprezidanto en Sorocaba, S-ano Manoel Blaz Garcia, senlace agadas ĉe la Radio-Klubo de Sorocaba farante bonajn programojn pri kaj en Esperanto.

Li sendis al ni eltranĉaĵon de "Jornal do Povo" el Itapetininga (SP), kun artikolo verkita de s-ro Gildo Moraes, simpatianto de la Internacia Lingvo kaj de la Esperanto-Movado.

S-ano Blaz sciigis nin pri la jena grava novaĵo: "LEI Nº 1857, de 18 de março de 1976.

Declara de Utilidade Pública o "Sorocaba Esperanto-Klubo".

A Câmara Municipal de Sorocaba decreta e eu promulgo a seguinte lei :

Artigo 1º - Fica declarado de utilidade pública de conformidade com a Lei nº 444, de 29 de agôsto de 1956, o "SOROCABA ESPERANTO-KLUBO".

Artigo 2º - Esta lei entrará em vigor na data de sua publicação, revogadas as disposições em contrario.

Prefeitura Municipal, em 18 de março de 1976, 322º da fundação de Sorocaba.

a) Armando Pannunzio-
Prefeito Municipal

a) Fernando Bordieri -
Secretário de Atividades Jurídicas e Internas

a) Antonia Poveda Garcia -
Chefe de Divisão de Comunicações e Arquivo".

Publicação no jornal "Cruzeiro do Sul", de Sorocaba no dia 24-3-1976.

NOVOS VICE-PRESIDENTES

Ao ensejo do XI Seminario de Esperanto, o presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto convidou e aceitaram colaborar com a organização como vice-presidentes para especialidades diversas os seguintes coidealistas, que participaram do certame:

Dr. Nid Dutra D'Amorim

Dr. Oswaldo Pires de Holanda

Dr. Braz Cosenza

Prof-ro Wilson F. Martins

Deodato França Melo

Darcy P.Machado Gaia

Francisco R.M.Sobrinho

Manoel Borges dos Santos

George Otto Vaske

Vicente Caetano.

Com a nomeação destes novos vice-prezidentes o nosso quadro atingiu um número bem elevado de colaboradores (50), com os quais pretendemos prosseguir nossa luta em prol da causa esperantista.

Com grande satisfação verificamos que 18 dos nossos até então 40 colaboradores compareceram ao XI Seminario, aliando o seu valioso apoio ao interessante certame.

-----****-----

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis la jenajn el donitaĵojn, kiujn ni el kore dankas:

Viverbahia, Katalogo de spiritismaj libroj, Reformador, Desed-54, Esperanto Aldono, La Skolta Movado, Correio Fraterno do ABC, Lar Católico, A Candeia, O Município el São João da Boa Vista.

Rezende (RJ)-A_ano Sirio Silva sugestas,ke en ĉiu urbo formiĝu grupo de 5 personoj , kiuj disvastigu kaj eble instruu Esperanton.

La sama grupo povus varbi anojn por UEA, aranĝi progresigan kurson de la Internacia Lingvo kaj kolekti adresojn de s-anoj.

São João da Boa Vista (SP)

A Câmara Municipal desta cudade em 30-12-75 votou a Resolução 13/75 dispondo sôbre a instituição do concurso TROFEU CULTURA E EVOLUÇÃO, no valor de um mil cruzeiros (Cr$1.000,00) anualmente, a ser disputado pelos colégios da cidade, vencendo aqueles que se classificaram em 1º lugar por três vêzes.

O Troféu será representado por medalhas de outo (5pontos), de prata (3 pontos) e de bronze (1ponto) em competições:

a) Para Professores que diplomarem maior número de alunos no curso elementar de Esperanto, sob a supervisão da Associação Paulista de Esperanto;

b) Para Alunos: I-Trabalhos diversos sobre Esperanto; e II-Trabalhos escritos em Esperanto - prosa e III-em verso. As inscriçoes são aceitas até 30-IX de cada ano e o julgamento até 31-outubro.

As medalhas serão entregues anualmente enquanto durar o concurso e o Trofeu após a sua conquista, todos em sessão especial destinada à entrega do Prêmio "Lazaro Zamenhof".

A Resolução acha-se em vigor

desde a data de sua assinatura e publicação. Firmaram-n'a o presidente da Câmara - Dr. Rudney Fracaro e o 1º Secretário Dr. Helio Corrêa Fonseca, aos quais felicitamos.

Parabens ao nosso vice-presidente Dr. Jatir Gonçalves Vieira, promotor do relevante acontecimento, digno de imitação de outros colaboradores.

CURSO DE ESPERANTO

Nona Lição

Feito o estudo das regras gramaticais nas lições anteriores, vejamos agora alguns exercícios:

Ekzerco I

Brazilo estas la nomo de nia kara lando, kies ĉefurbo estas Brazilio.

Nia ĉefurbo estas nova kaj juna; ĝi estas nova ĉar ekzistas por anstataŭi la malnovan Rio de Janeiro, kaj ĝi estas juna pro tio ke ĝi havas nur 16 jarojn.

Tiel vi komprenas kio estas la diferenco inter nova kaj juna.

Brazilo estas grandega lando. Ĝi konsistas el 21 ŝtatoj kaj 4 teritorioj inkluzivante la insulon Fernando de Noronha. Estas ankaŭ la Federacia Distrikto kie troviĝas la ĉefurbo.

Pli ol 100 (cent) milionoj da loĝantoj vivas en la 8.511.965 (ok milionoj, kvincent dek unu, naŭcent sesdek kvin) kvadrataj kilometroj.

Traduko: -Exercício I

Brasil é o nome do nosso querido país, cuja capital é Brazília.

Nossa capital é nova e jovem; ela é nova porque existe para substituir a velha Rio de Janeiro e é jovem por ter apenas 16 anos.

Assim vocês compreendem o que constitui a diferença entre nova e jovem.

Brasil é um grande país. É constituido de 21 estados e 4 territórios incluindo a ilha de Fernando de Noronha. Há ainda o Distrito Federal onde se encontra a capital.

Mais de 100 milhões de habitantes vivem nos 5 milhoes quinhentos e onze mil e novecentos e sessenta e cinco quilometros quadrados.

Nota.- Prestem atenção no N do acusativo nos complementos verbais!

KIEL PRAKTIKI LA LINGVON ?

Inter multaj eblaj sugestoj, jen PASPORTA SERVO, la gastiga servo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

Kiel ĝi funkcias?

Volontuloj senpage gastigas vojaĝantojn kiuj tion petas.

La servo havas taskon ri-

latigi gastojn kun gastigantoj, kaj la gastigo kaj ties kondiĉoj estas libere interkonsentitaj inter gasto kaj gastiganto.
(Ekz.:daŭro de gastigo, ĉu kaj kiom da mono estas postulata kiel repago de manĝo kostoj, tukopurigado). Nura regulo estas senpago de la gastigo mem: la servo ja ne povas peri komercaĵn ofertojn.
La servo kolektas adresojn de gastigantoj en ĉiuj eblaj landoj kaj publikigas la liston de gastigantoj , kiu estas dissendita al ĉiuj aliĝantoj de la servo.

Oni fariĝas gastiganto per nura sinanonco al servo (adr.:Richard & Marie CASH- 9, rue du Languedoc,F-78690 LES ESSARTS LE ROI .

Oni ricevas la gastiganto liston per pago de aliĝkotizo.
Aliĝante al la servo,viaj vojaĝemaj kursanoj spertos agrablan manieron viziti eksterlandon,pleruzon de internaciaj kontaktoj kaj kuraĝigan progreson de sia lingvoscio.

Same, viaj malpli junaj aŭ nevojaĝemaj kursanoj kaptos unikan ŝancon ĝui internacian esperantan etoson kaj perfektigi sian lingvoscion, fariĝante gastigantoj. Sufiĉas por tio ke oni disponu pri ekstra ĉambro, ekstra litoaŭ eĉ nur libera planko (ĉar multaj vojaĝantoj junuloj kunportas dormosakon).

FAKTOJ:

En 1974-17 personoj gastis ĉe 10 gastigantoj de PASPORTA SERVO, en Francio,.Nederlando, FRG, Belgio, Ĉekoslovakio, Sevedio.

17 gastoj venis de: Pollando, Japanio, Francio, FRG, Svedio, Britio, Hispanio.

En 1974 estis nur 39 gastigantoj.

En 1975 estis 100 gastigantoj. Do la sérvo progresas ĉiujare kaj ebligos al multaj gekursanoj plibonigi la scion pri Esperanto kaj samtempe amuzadi . .

Skribu al la adreso donita kaj utiligu tiun mirindan servon !

-----****----

"Este boletim é absolutamente neutro sob todos os pontos de vista".

---***---

SCIENCA REVUO

Laŭ informo de la ĉefredaktoro, tiu revuo kvamkam iom malfruiĝis, kiel klarigite sur la bulteno sendita kune kun ĝi, daŭrigos aperi dum la nuna jaro, sed la unua numero por 1976 aperos en septembro.